**PILO-PRESS**

Internacia

Informservo

Jara abonkotizo

30,- GM

kun germana eldono 40,-GM

**Eldonanto/Herausgeber:**
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69
Pĉk. Nürnberg
819 56-851



N-ro 3/1975 - 20 jan 1975
Aperas ĉiusemajne

## 4a Laborkonferenco en Budapest de ILUS

Budapest.(pp/bz) La laborgrupo "Interlingvistiko kaj Lingvokibernetiko" (germane: Interlinguistik und Sprachkybernetik -ILUS) de la Internacia Asocio pri Programita Instruado (Internationale Gesellschaft für programmierte Instruktion - GPI), centro en Okcidenta Berlino, kunlabore kun la Hungara Esperanto-Asocio aranĝis sian 4an laborkonferencon la 3an de januaro 1975 en Budapest.

Ĉe la konferenco, gvidata de Hermann Behrmann, la direktoro de la Tutlanda Klerigteknika Centro, d-ro Simon, Gyula, en sia ilustrita prelego prezentis la laborkampojn, taskojn kaj la organizon de sia instituto. Li parolis pri tio, kiel fariĝis dum ne tute 2 jaroj tiu ĉi centro, fondita fare de UNESCO en 1973 per du personoj, hodiaŭ jam institucio kun tutlanda graveco, dunganta 57 kaj baldaŭ 75 personojn, havanta seriozajn internaciajn rilatojn.

D-ro prof. Helmar Frank, direktoro de la Esplor- kaj Evolucentro pri Pedagogia Kibernetiko en Paderborn, prelegis pri la instruaŭtomatoj, evoluigitaj kaj aplikitaj ĉe ili, detale li konigis pri ROBBIMAT II KYBERNET, kiu celas individuan instruadon sinkronan, rapideco estas regulebla, ebligas tujan ripeton, ekde 1974 funkcias en Paderborn kaj en Parizo.

D-ro prof. István Szerdahelyi, estro de la Esperanto-fakgrupo de la Filologia Fakultato de Scienca Universitato Eötvös Loránd en Budapest, en sia mallonga prelego, kiu tamen vekis multajn pensojn, skizis la nuntempan situacion de la programita instruado en Hungarujo, kaj la ĉi-rilatajn taskojn por la estonteco. Li malkaŝis, ke la programado kiel metologia principo ankoraŭ ne estas tute ĝenerale konata kaj akceptita. Li akcentis, ke la teknikaj instrumentoj - de la magnetofono kaj diaprojekciilo ĝis la lingvolaboratorio kaj instruaŭtomato - estas nur helpiloj, kiuj plifortigas la efikon de la bona programo. Do gravas la programo, kaj oni devas instrui la programadon al la venontaj pedagogoj - la nunaj studentoj -, kiuj devos plenumi la postulojn de la moderna, efika instruado, precipe post la klerigreformo en 1990.

D-ro Balázs Béla, profesoro de la Ekonomika Universitato Karl Marx en Budapest, prezentis individuan instrumaŝinon, projektita de si mem. D-ro Simon per sonfilmo prezentis la instruaŭtomaton "Magnocor", produktita far la Budapeŝta Elektroakustika Fabriko. Ĝi servas grupan instuadon, cirkulas en Hungarujo, kaj estas inda eĉ je internacia intereso.

La eksterlandajn gastojn surprizis la hungaraj eksperimentoj kaj rezultoj, pri kiuj ili ne sciis ĝis nun. Tio ĉi eĉ plifirmigis prof. Frank en sia plano, por kompili esperantlingvan resumaron en fakrevuoj, aperantaj en la plej diversaj landoj, pri pedagogia kibernetiko, klerigtekniko k.s.

Dum kaj post la konferenco ekestis kelkaj konkretaj kaj kondiĉaj interkonsentoj ĉi-rilate.

Kun granda intereso akceptis la ĉeestantoj la prelegon de programprojektisto inĝ. Antal Münnich pri la karakterizaj ecoj de la komputila programlingvo PROGRESO 1.

El la vivo de Germana Esperanto-Junularo

Münster/Paderborn. (pp) Dum la membrokunveno de Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kadre de la 18a Internacia Seminario en Paderborn estis elektita jena estrarO:

Prezidanto: Ulrich Brandenburg, Münster
Vicprezidanto: Helmut Klünder, Burgsteinfurt
Kasisto: Heinz-Dieter Platz, St. Martin
Ĝenerala sekretario: Franz Kruse, kun speciala fako:loka agado
Sekretario: Guido Brandenburg, kun speciala fako: membrokartaro, kotizkonto
Estrarano por renkontiĝoj: Klaus Schubert, Hamburg.

Plena protokolo pri la membrokunveno aperos en Eŭropa Esperanto-Revuo 1/75.

Paskaj Ferioj en Kastelo Grésillon

Grésillon (pp) De la 22a de marto ĝis la 29a de marto 1975 okazos en la Esperantista Kulturdomo Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé, paskaj ferioj. Ella programo:

Renkonto de junaj esperantistoj el diversaj landoj (infanoj 9-13jaraj akompanitaj), kursoj diversaj aktivaĵoj.

Por pli aĝuloj: "Pedagogio kaj Esperanto", paroladoj, debatoj, distraj vesperoj.

De la 30a de marto ĝis la 5a de aprilo okazos la dua parto de la paskaj ferioj, nome "Praktiko kaj esprimado": Praktiko de la lingvo, gramatiko kaj esprimado, distraj vesperoj. Aliĝu ĉe la supra adreso!

Tria marŝo de Eŭropo

Bruselo (pp) Dum la proksimaj paskaj ferioj, ekde la 29a de marto ĝis la 11a de aprilo, granda grupo de junaj homoj piediros kelkajn centojn da kilometroj, nome, de Bruselo al Strasburgo, tra Namur, Ciney, Bastogne, Martelange kaj Luksemburgo. Tiu marŝo havas la celon averti la popolon pri la nunaj problemoj el eŭropa perspektivo, enkadre de la ĉeftemo de la marŝo "Amikeco trans limoj".
Eblas marŝi ankaŭ nur dum kelkaj etapoj, sed estas grave ke eksterlandaj esperantistoj partoprenu ĉar estas bona ebleco por alparoli la neesperantistan junularan medion kaj por pruvi ke Esperanto povas fariĝi taŭga lingvo por Eŭropo.
Informojn petu ĉe la organizanto: S-ro René Rochette, 18, rue Gatti de Gamond, B-1180 Bruselo.

Trilanda renkontiĝo en Weert.

La printempa Trilanda Renkontiĝo de esperantistoj el Belgio, FR Germanio kaj Nederlando okazos je la semajnfino de la 3a kaj 4a de majo 1975, en la mez-limburga urbeto Weert, Nederlando, en la salonoj de la trinkejo-restoracio "De Poort van Limburg", Bassin 11. La renkontiĝo estos pli ampleksa ol kutime, ĉar ĝi realiĝos en plena kunlaborado kun N.GG.E. (Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto), kiu samtempe kaj en la sama restoracio aranĝos sian jarkunvenon kaj instrusemajnfinon. Detala programo kun aliĝilo estas ricevebla ĉe: S-ro L. Hendrix, Slotstrato 15, Weert, NL, telefono 04950-35076).

Eŭropa Dokumentaro

La revuo Eŭropa Dokumentaro nun definitive aperos ankaŭ dum 1975. La necesa nombro da abonantoj estis atingita. La nova abonkotizo por 1975 estas por abonantoj en FR Germanio 12,- GM (13 sfr). La peranto por FR Germanio estas Ludwig Pickel, Libroservo, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113, Pĉk. Nürnberg 819 56-851

## Homoj kaj Nomoj
### kun kaj sen Renomoj

Rolf Bugge-Paulsen okaze de sia 80jara tago estis nomita Honora Prezidanto de Norvega Esperantista Ligo. Deputacio de NEL sub gvido de la prezidanto, d-ro Carl Stöp-Bowitz, transdonis al li en lia hejmo belan diplomon kiel pruvon pri la honoro. Rolf Bugge-Paulsen estas vaste konata inter esperantistoj kaj ne-esperantistoj en kaj ekster Norvegio kiel multjara prezidinto de NEL, komitatano de UEA dum multaj jaroj, redaktinto de Norvega Esperantisto, estrara komisiito pri radio, gvidinto de aro da Esperanto-kursoj, kunverkinto de plej studata lernolibro por norvegoj, reprezentanto oficiala de norvega registaro je granda nombro da UK. Por Esperanto li aktivas jam 67 jarojn.

D-ro Bernward Löwenberg, urbdirektoro de Paderborn, parolis la 9an de januaro en la sonmagazino "Mittagsmagazin" de la Okcidentgermana Radio Kolonjo. Temis pri urbĝemeliĝoj. Post kiam la antaûa diskutpartoprenanto diris, ke oni sufiĉe bone interkompreniĝas per manoj kaj piedoj, d-ro Löwenberg diris, ke en Paderborn oni klopodas perfektigi la interkompreniĝon helpe de la planlingvo Esperanto.

Prof. d-ro Helmar Frank kaj d-rino Brigitte S. Meder, ambaû el Paderborn, partoprenis la 12an de januaro kibernetikan konferencon en la Hotelo Plaza, Okcidenta Berlino. D-rino Meder gvidis apartan kunvenon de sciencaj institutoj, kiuj intencas partopreni la sciencan akompanadon de la lernejaj eksperimentoj kun Esperanto en Paderborn.

Aûgusto Ochoa, profesoro ĉe la universitato de Bogotá, faris la lingvan ekzamenon de Esperanto antaû trikapa ekzamen-komisiono de Germana Esperanto-Instituto en Frankfurt/M, la 11a de januaro. Profesoro Ochoa post unujara studrestado en Eûropo baldaû reflugos al Sudameriko. Dum sia restado en Bad Homburg li ankaû enkondukis Esperanto-kurson en lernejo de Bad Homburg.


D-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, sonbende transdonis al la tutmonda esperantistaro sian novjaran mesaĝon "La Esperanto-Movado en 1975" kadre de la Esperanto-Ekspreso de Pola Radio, dimanĉe, la 19an de januaro. (La tekston oni povas legi en Pilo-Press n-ro 1/75)

S. Swistak, estrarano de UEA pri informado kaj prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, en la sama Esperanto-Ekspreso, raportis pri la rezultoj de la UEA-estrarkunsido en Rotterdam, la 11 kaj 12 jan 75. Ankaû pri tiu estrarkunsido Pilo-Press jam raportis (vd. PP 2/75).

Michael Zeilinger, Fürth, lumbildprelegos dimanĉe, la 2an de februaro, pri siaj vojaĝimpresoj en Japanio dum Esperanto-kunveno en Fürth, (Martin-Luther-Heim, Benno-Mayer-Str. 13). Komenciĝo 14,30 horo.

**************

Moviĝema hundo aû spertoj de agema esperantisto



## Novaj libroj




# La libro, kiu valoras la investon

En mondo de nestabilaj valoroj, kie kvalito estas oferata al kvanto, maloftaj estas la aĉetaĵoj, kies valoro kreskas de jaro al jaro kaj kies apero videble ŝuldiĝas al grandega homa fortostreĉo. Sed tia estas la verko "Esperanto en Perspektivo": monumenta kompendio de la Esperantaj movado kaj kulturo tra 87-jara ekzistado — kaj, perspektive, en la estontecon. Sur ĝiaj 876 paĝoj troviĝas praktike ĉiuj scioj, kiujn povas bezoni la uzanto de la Internacia Lingvo, inkluzive de multaj faktoj neniam antaŭe publikigitaj.

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,– gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroservo de UEA.

Prezo en FRG: 86,80 DM inkl. imposto kaj afranko

Kredu min Sinjorino de Cezaro Rossetti
kun nova antaŭparolo de Reto Rossetti
SATEB 1974 (dua eldono), formato 13,2 x 19 cm, broŝ., 260 p.
prezo 5,80 DM

Skizoj pri Teorio de Esperanto de E. Drezen
kun postnotoj de R. Haupenthal
Dana Esperanto-Eldonejo 1974, fotorepreso de la 1a eldono 1931,
formato 14,3 x 20,1 broŝ., 40 p., prezo 4,50 DM

Sovaĝa Herbaro de Lusin
Fremdlingva Eldonejo Pekino 1974 (10 Es 30 P)
formato 12 x 18,6 cm, broŝ. 88 p., prezo 1,25 DM

La Ergokrata Evangelio de Heinrich Färber
tradukis Instituto de AEF, formato 14,3 x 20,6, broŝ. 100 p.,
ofs., prezo 3,50 DM

Paŝoj al plena posedo de William Auld
progresiga legolibro de Esperanto kun lingvaj ekzercoj
Eldonis Heroldo de Esperanto + Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1974,
3a eldono, formato 12,3 x 19,2 cm, broŝ., 240 p., prezo 9,10 DM
De ĉi tiu populara legolibro aperis ĝis nun jam 17 200 ekzempleroj: Unua eldono 1968 eldonkvanto 2000; dua eldono 1970 5200; tria eldono 1974 10000.

Mendu ĉe: Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113
Pĉk. Nürnberg 819 56 - 851

****************

## Jarlibro de UEA

Aperis la dua parto de la UEA-libro 1974, kiu entenas krom la raporto de Estraro pri la agado de Universala Esperanto-Asocio dum la jaro 1973/74 kaj la listo de landaj kaj fakaj organizaĵoj speciale ampleksan libroliston. Por 1975 la jarlibro aperos nur en unu volumo.